

# Tra la Mondo

Tutmonda ilustrata Revuo esperantista

TRA LA MONDO. ESPERANTO. SEMAS. SIAJN. BONATOJN.  
 PLI FACILIGAS. LA. KOMERCAJN. INTERRILATOJN. KONIGAS.  
 LA. INDAJN. ELTROVOJN. KUNHELPOS. POR. ANSTATAVI.  
 DE. FRUKTODONA. PACO. LA. SANGAJN. BATALADOJN.  
 KIUJ. DISSTRAS. HOMA RON.



Alegorio speciale verkita de Sinjoro Pillel, fama gravuristo de medaloj, sendita en la francan Romon lernejon post ricevo de l' granda premio.

# ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

	Paĝo.
<b>Nuntempaĵoj</b> : Doktoro Zamenhof « intervjuita » de AŭGUSTO MONTROSIER; Ĉieaj eĥoj . . . . .	17 <sup>a</sup>
<b>Pri Esperanto</b> : La Bulonja Kongreso, de S <sup>ino</sup> DANNE kaj AŭGUSTO MONTROSIER ( <b>Francujo</b> ) . . . . .	19 <sup>a</sup>
<b>Diversaĵoj</b> : Pentekosta rajdado, de P. OTTO SIMON, el Ung Hradish ( <b>Moravujo</b> ) . . . . .	24 <sup>a</sup>
<b>Diversaj Sciencoj (Arĥitekturo)</b> : La Brou'a preĝejo, de S <sup>o</sup> EVROT, el Bourg en Bresse ( <b>Francujo</b> ) . . . . .	26 <sup>a</sup>
<b>Teatra Fako</b> : « La Pasio », en Nancio, laŭ KANONIKO PETIT ( <b>Francujo</b> ) . . . . .	28 <sup>a</sup>
<b>Militistaro kaj Maristaro</b> : Pri Marokujo, de PAUL DIFFRE, el Konstantino ( <b>Alĝerio</b> ) . . . . .	30 <sup>a</sup>
<b>Felietono</b> : Rememoroj, de KAZI GIREJ ( <b>Siberujo</b> ) . . . . .	31 <sup>a</sup>
<b>Miksaĵoj</b> : Por la propagando, amuzaĵoj, ludoj, k. t. p. . . . .	32 <sup>a</sup>

*Oni povos represi artikolojn pri la kongreso kondiĉe ke oni citu ilian devenon.*

REPRESO DE ALIAJ ARTIKOLOJ Aŭ ILUSTRAĴOJ ESTAS MALPERMESATA.

## REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

Sendi ĉiujn dokumentojn (*krom miksaĵoj*) al S<sup>o</sup> Montrosier, 74 Faubourg Bannier, Orléans, (France). Miksaĵoj, t. e.: ludoj, amuzaĵoj, problemoj kaj solvoj devas esti sendataj al S<sup>o</sup> Brunet (vidu la 32<sup>an</sup> paĝon).

Sendi mendojn KUN MONO al:

Administranto de « Tra la Mondo », 15, Boulevard des Deux Gares, Meudon (S. et O), France.

## Al la Gelegantoj.

Antaŭ ĉio, mi deziras danki du homojn, kiuj helpis multe por la sukceso de la 1<sup>a</sup> n<sup>o</sup> de « Tra la Mondo ». Pro mia reveno en Francujon, mi estis multe ĝenata por la direktado de l' preparada laboro, kaj por la korektado de l' presprovaĵoj.

Dank' al nia eldonisto, S<sup>o</sup> Witteryck, kiu interesiĝas je la afero kvazaŭ ĝi estus lia; dank' al mia bonega amiko, S<sup>o</sup> D<sup>ro</sup> Seynaeve, kiu prenis sur sin la ŝarĝegon de l' korektado, la Revuo aperis je la dirita dato, malgraŭ la multegaj kaj grandegaj malfacilaĵoj de tia entrepreno.

Jam S<sup>o</sup> Witteryck okupiĝas por haviĝi belajn supersignitajn literojn por subtitoloj kaj subaj klarigoj; kaj S<sup>o</sup> Seynaeve daŭrigas memvole la korektadon de l' presprovaĵoj. Al ili dankon, ne nur de « Tra la mondo », sed ankoraŭ de ĉiuj Esperantistoj, por kiuj la Revuo estos bonega propagandilo.

A. MONTROSIER.

### Ricevita literaro de « TRA LA MONDO »

Dum la kongreso, unuvoĉe ĉiuj konsentis pri tiu utilo. La multaj leteroj ricevitaĵ montras ke, malproksime, oni opinias same. Nur en la ricevita literaro trovita post la kongreso estis korespondataĵoj el *Francujo, Peruo, Svedujo, Germanujo, Moravujo, Tunizio, Anglujo, Rusujo, Turkujo, Persujo, Porto Rico, Norvegujo, Alĝerio, Bulgarujo, Holandujo, Hindujo, Italujo*; aŭ dokumentoj por la Revuo, senditaj de personoj dezirantaj

kunlabori en ĝi; aŭ aproboj amike donitaj; aŭ mendoj de personoj kiuj, ricevinte specimenon, deziras tuj abonigi:

« Mi anoncos vian revuon en « Antaŭen Esperantistoj! » Kaj poste mi verkos ion por via gazeto, *kiun mi kredas tre necesa por nia afero* ».

FEDERICO VILLARÉAL (Peruo)

« Mi jam antaŭ longe revadis pri la ebleco, pri la neceso de simila eldono, kaj nun, kiam miaj revoj efektiviĝas, mi plezure helpados al ili. Mi sendube faros ĉion por disvastigado de via revuo ..... mi presigos en rusan gazetaron kelkajn artikolojn pri la graveco, simpatindo, kaj kunsentindo de via revuo.

POLJANSKIJ (Jalta, Rusujo).

S<sup>o</sup> Oreškov, el Plovdiv, la sindona eldonisto de « Rondiranto », tute entuziasmiĝis pri « Tra la mondo ». Ne sukcesinte daŭrigi sian revuon, li deziras ke ĝiaj ekslernantoj elektu « Tra la mondo » por ĝin anstataŭigi (Vidu ĉi poste).

« Ĉiujn miajn komplimentojn por la 1<sup>a</sup> n<sup>o</sup> de « Tra la Mondo » mi skribas tuj por aboni. »

S<sup>o</sup> NICOLAS (Tunizo).

« Bonvolu enskribi min kiel abonanton por unu jaro de via belega kaj interesega ĵurnalo « Tra la mondo ».

k. t. p....

LEGEAS (Francujo).

## AL LA ESPERANTISTA GAZETARO.

Tre kore ni dankas tiujn el niaj kunfratoj kiuj bonvolis anonci la naskiĝon de nia revuo, kaj tiel helpi nin dum la malfacila komenco de l' entrepreno. Eble ni ne konas ĉiujn, kiuj parolis por ni; ni danku: **L' Espérantiste, Suno Hispana, Lingvo internacia, Holanda Pioniro, Kongresa libro, Gefratato esperanta, Esperanto**, kiuj longe kaj tre favore parolis por ni; **Germana Esperantisto, The British Esperantist, Ruslanda Esperantisto, Juna Esperantisto, Espero katolika**, favoraj ankaŭ por « Tra la Mondo ».

Ni petas ĉiujn niajn kunfratojn bonvoli sciigi nin pri artikoloj de ili dediĉitaj al ni.

Revuoj kiuj, ne havinte riprezentantojn ĉe la Kongreso, dezirus represi raportojn faritajn en « Tra la Mondo », esperantajn aŭ tradukitajn, povos ĝin fari. Ni nur petas ilin bonvoli sciigi la devenon de tiuj artikoloj, aldonante la jaran abonkoston kaj la adreson de l' administracio.

« TRA LA MONDO ».

## NIA VENONTA NUMERO

Nuntempaĵoj: **Rusa-Japana milito — Sveda-Norvega konflikto**, de S<sup>o</sup> Chavet (Parizo).

**Bulonja Kongreso** (sekvo): La balo, de S<sup>o</sup> Pourcines (Nancy), kun fotografaĵo de l' ĉefaj kostumoj; vojaĝo en Anglujon kaj Kales'on (kun fotografaĵoj);

Prezentado de l' « **Herezistoj** » en Beziere, de Fraŭlino Flourens; la « **Golf** »-ludo, de S<sup>ro</sup> Haxton, el St Andrews; la **Profesiaj soldatoj en Svedujo kaj ilia malapero**, de S<sup>ro</sup> Lundgren; la **vinberistaj festoj** en Vevey kun ilustraĵoj, de S<sup>ro</sup> Hodler (Svisujo), k. t. p. ne kalkulante artikolojn jam komencitajn aŭ anoncintajn.

# NUNTEMPAĴOJ

2a No

Aŭgusto 1905.

## Doktoro Zamenhof.

« Intervjuita » (1) de AŬGUSTO MONTROSIER.

Doktoro Zamenhof estas « la homo de l'tago ». Al nia ĉefredaktoro, kiu ofte kaj intime proksimiĝis al li dum la kongreso, li bonvolis konigi siajn impresojn pri la jam pasintaj tagoj, siajn dezirojn kaj esperojn por la estonteco.

Bulonjo, Sabaton, la 12<sup>a</sup> de Aŭgusto 1905.

Jen finiĝis la Kongreso, kaj bone finiĝis, per la postvespermanĝo en Calais (Kaleso). Post kelke da horoj mi forveturos Parizon, kie mi dediĉos la kelkajn libertempajn tagojn miajn ankoraŭ ĝnotajn, al la legantoj de « Tra la Mondo »

Se mi tuj komencus! Kion pli bonan mi povus fari ol kolekti impresojn de nia kara majstro. Mi do serĉas lin kaj lin renkontas alpaŝantan hejmen kun mia afabla kunfrato, S<sup>ro</sup> Borel, jam konita de miaj legantoj.

Ni triope suprenmarŝas la straton Wissocq kaj alvenas apud la domon de S<sup>ro</sup> Michaux, kiu estis, dum la Kongreso, vera celo por pilgrimo.

Atendante la foriron de S<sup>ro</sup> Borel, mi paŝadas sur la trotuaro, preparaute mian demandaron. Grava afero! Estas mia unua « intervjuo », kaj intervjuo esperanta!

Doktoro Zamenhof akceptas min kun la mano antaŭigita kaj kun sia afabla kaj kutima rideto. Malantaŭ liaj okulvitroj, liaj bluaj okuloj, okuloj de Slavo revema kaj bona, direktiĝas al mi kaj mi admiras unu fojon plie tiun homon tiel energian kaj persisteman, malgraŭ timema ŝajno, ne altkreskan, kaj tamen tiel grandan per la genio.

Tuj kiam li scias la celon de mia vizito, lia vizaĝo lumiĝas, kaj mi ne bezonus aŭdi lin paroli por senti, ke li estas feliĉa super ĉia espero.

« La rezultatoj de nia kongreso estas pleje kontentigaj: ĝi montris evidente, ke la lingvo tute ebligas libere paroladi; ankaŭ ke ĝi efektive naskas fratecon inter diversaj popoloj, por kiuj ĝi estos komuna ligilo.

— Vi do estas plene feliĉa

— Jes, kaj de l'unua tago ĝis la lasta, en Anglujo kiel en Francujo, mi vivadis en daŭra kontento. »

Je tiu ĉi momento nubeto vidiĝas sur la frunto de l' Doktoro, kiu aldonas:

« Eble, kelkaj ne estos kontentaj ĉar oni ne decidis kelkajn punktojn pri la organizado. Sed tio ĉi ne estis, nune, la ĉefa celo trafota. Tiu ĉi: elmontro de nia ekzistado kaj de l' facileco de la lingvo, estas atingita pli ol mi esperis, kaj pri tio ni devas ĝoji sen malantaŭpenso.

— Ĉu vi forlasis la ideon de organizado?

— Ne, ĝi evidente estas utila. Sed oni preferis ĝin forlasi, prefere ol naski malpacojn bedaŭrindajn.

— Por tute forigi iajn malpacecojn, kelke da personoj opinias ke niaj estontaj kunvenoj povus esti nur dediĉotaj je tiaj aŭ aliaj festoj, prezentaĵoj teatraj, kaj aliaj elmontraĵoj publikaj.

— Kompreneble tiaj elmontraĵoj estas tre gravaj; sed tamen *veraj*, plenaj kongresoj, kaj ne sole festoj, devos okazi ĉiujare dum kelke da tempo. »

Ŝajnas al mi ke venis la momento por paroli pri la lingva komitato kaj la estonta kongreso.

Pri la unua punkto, la Doktoro diras nur ke, ĵus tiu ĉi matenon, li ricevis avizon, ke S<sup>ro</sup> Boirac, Rektoro de l' Dijona akademio, akceptas la oficon ricevi la tutan korespondadon de l' lingva komitato. Eĉ S<sup>ro</sup> Boirac deziras, ke D<sup>ro</sup> Zamenhof bonvolu informi pri tio la Esperantistaron per la esperantista gazetaro. Jen do tion ni faris, kaj la gele-

gantoj de « Tra la Mondo » unuaj eksciis tiun gravan informon, kiu povos nur ĝojigi ĉiujn Esperantistojn.

Pri la komitato organiza de l' kongreso, la Doktoro ne povas ion diri.

« La afero postulas longajn pripensojn, faratajn kviete kaj sen rapido. Oni ne devas atendi decidon antaŭ la monato de



Fot. Meys

Kl. « Illustration »

DOKTORO ZAMENHOF ĈE BULONJO.

(1) Interviewer, *signifanta*: demandi iun pri tia aŭ alia punkto, pri kiu ĝi estas aparte kompetenta, iĝis sufiĉe internacia por ke oni povu ĝin internacie skribi.

Oktobro aŭ Novembro. Tiam ĝi ankaŭ estos konigata per niaj specialaj revuoj.

— Ĉu, de la momento kiam oni disputis pri la lando, kie okazus la Kongreso, vi ricevis iajn montrajn pri la lando elektota.

— Nenion oficialan, sed ŝajnas ke Svisujo elvokas aprobon de multaj. »

Kaj la Doktoro, post iom da intima pripensoj, aldonas

« En niaj kongresoj, la interkonsento de ĉiuj estas tute necesa. Tion ja diru: ni alveturis al la kongreso kun iom da antaŭtimo. Nenia malpaco, feliĉe, montriĝis; tamen, iom pro timo pri tia bedaŭrindaĵo, oni havis ian singardon kaj ŝanceliĝis libere paroli. Estas tute necese, ke oni forĵetu ĉiun malpacon, kiu malutilus la Esperantistan aferon.

Forĵetinte la malpacon, la atmosfero estos malpli peza, oni povos pli libere kaj utile disputi. »

Kaj tiel parolante, nia majstro min rigardas fikse, tra siaj dikaj okulvitroj rajdantaj lian fortikan nazon, kvazaŭ li volus penetrigi en min kaj per mi en miajn legantojn, tiun konvinkon pri la neceseco de kora interkonsento: por unu ideo, kaj ne por ni, ni laboras; nenio do devas nin disigi!

Ekbruliginte rusan cigaredon kaj rigardante la fumon disigi en la aero, la Doktoro elvokas nun sian vojaĝon: Berlin'o, kies grupo, ankoraŭ malgranda kaj malforta, permesas tamen esperi multe; Parizo, kie lia ĉeestado komencis altiri la atenton de l' gazetoj, precipe dank' al la vizitoj faritaj ĉe la Urbeŝtaro, tute favora por la ideo, kaj ĉe la ministro de l' Publika Instruado, aprobanto de l' ideo de la helpa lingvo. Oni ne devas trograndigi la senton de

l' ministro. Sed simpla aprobo estas jam tre grava kaj ankaŭ lia partopreno en la Patrona komitato de Esperanto por Francujo! Bonegan impreson ricevis la Doktoro de la vojaĝeto en Anghujon. « Angloj » li diris, « ne rapide flamiĝas, sed ili estas homoj tre pripensemaj kaj ne flankiĝemaj ». Li do esperas forte, ke baldaŭ bonege iros la afero en tiu granda lando.

Ni nun parolas pri la ideoj naskiĝantaj ofte en cerbo pri tiu aŭ alia persono, konita nur koresponde. Kaj nia majstro konfesas ridetante, ke li kaj lia edzino kredis, ke mi estas maljuna kapitano: same kiel mi faris al mi la ideon, ke nia juna kaj flama kunlaboranto, Otto Simon, estas maljuna profesoro kun larĝa kaj bukla blanka barbo, kaj grandaj okulvitroj sur la nazo!

Kial? mistero; rezultato de l' konsentaĵo, kiu postulas ke, teorie kaj nepre, tia persono havu tian fizionomion!

Fine, la Doktoro resumas sian impreson.

« La kongreso devas forte nin kuraĝigi, ĉar nun ni havas la plej gravan pruvon por la mondo, ke sunĉas veni al ni por interkomunikigi. Kaj la Esperantistoj devos penadi alkonduki multajn gastojn en niajn esloutajn kongresojn por ke tiuj ĉi vidu kaj aŭdu per siaj propraj okuloj kaj oreloj, kaj konvinkigiu, ke Esperanto ne estas utopio. »

Dezirante fine doni lastan kaj publikan adiaŭon al ĉiuj kongresistoj, D<sup>ro</sup> Zamenhof levigas kaj skribas la jenajn liniojn, kiujn mi kunportas kiel multvaloran memorajaĵon de mia lasta intervidiĝo kun la majstro amata, la estro respektigata de nia kolegaro.

*Ĝis revido, karaĵ samideanoj, en la venonta kongreso, en la jaro 1906. Mi esperas, ke ĉiu el ni faros, en la daŭro de la jaro ĉion konli povos, por tute bone kaj briste prepari la venontan kongreson.*

*Zamenhof*

## Cieaj eĥoj.

### Hispanujo.

Dum du kaj duono jaroj de regado, la konservativuloj konsumis kvin ministrarojn kaj, duonigite, devis transdoni la povon al la liberemuloj, kiuj ja ne estas kore unuigintaj. De la komenco de julio, la novaj provincestroj pretigas « la ilaron por voĉdoni deputatojn » laŭ la malnova kutimo hispana. Dume, la popolo rigardas indiferece tiujn procedojn, ĉar ĝi scias ke tiuj politikaj bataladoj nur taŭgas por malplibonigi la administracion de la Stato, kaj ke nur ministraro daŭra, kiu havas la tempon priokupi sin je la progresado materiala kaj morala de la lando, povas profiti al ĝi.

La morto de la serioza financisto S<sup>ro</sup> Villaverde, ĉefo de

unu el la du frakcioj reciproke interbatalantaj de la partio konservativula, fortikigis la alian kontraŭ la liberemuloj, kaj tion elpruas la lasta krizo, pro kiu eliris la ministro de financoj S<sup>ro</sup> Urzaiz, kiu estis anstataŭita, kun granda surprizo de la Hispanoj, de la glora inĝeniero S<sup>ro</sup> Echegaray. Tiu ĉi eminentulo pli ol tridek jarojn vivadis tute apartigita de la politikaj aferoj kaj pli ol dudek estis la mastro de la hispana dramarto.

En Madrido oni jam pretiĝas por fari indan kaj amikan akcepton al Prezidanto de la Franca respubliko, kaj tiel montri la dankon kaj simpatiojn de la Hispanoj al siaj najbaroj.

R. C.

*La sekvo sur la 25a paĝo.*

# PRI ESPERANTO



Fot. Candeville.

So Farnes. So Van Melckebeke, Patro.  
So Sam Meyer      So Witteryck      So Jamin      So Moscheles  
(l'Esperantiste).      (Tra la Mondo).      (Belga Sonorilo).      (Londono).  
So Grabowski      So Michaux.      Rektoro Boirac.  
Do Zamenhof.

ELIRO DE L' TEATRO KIE OKAZIS LA KUNSIDOJ.

## La Bulonja Kongreso.

Oni ne serĉu tie ĉi plenan raporton pri la Kongreso kaj la paroladoj faritaj. Laŭ tio, kion ni jam diris, la Revuo estas esence NE POR Esperanto sed PER ĝi: aliparte ni neniel volas konkurenci aliajn revuojn. Ni do tie ĉi serĉos nur doni fizionomion de l' Kongreso, aldonante detalojn kaj ilustraĵojn ne videblajn alie.

Ĝi do okazis, kaj ĝi estis perfekta, tute sukcesinta.

Nekomparebla elmonro de la taŭgeco de Esperanto por la internaciaj interrilatoj, ĝi montris al ĉiuj, ke Esperanto estas vera lingvo, parolata tiel facile kiel skribata. Kaj nenia kongreso, krom alia esperantista kongreso, vidigis aŭ vidigos homojn tiel malsimilajn per la nacieco interparolantaj tiom facile, tute same kvazaŭ ili estus el unu sola raso.

Kontentiĝo, ĝojo, espero estis legataj sur ĉiuj vizaĝoj; kaj multaj ĉerpis el tiu unua kontakto kun la majstro, D<sup>ro</sup> Zamenhof, kaj kun la plej famaj el

siaj samideanoj, novan forton por la estonta batalado.

### Bulonjo.

Bulonjo festas, Bulonjo ĝojas: jam de kelkaj tagoj antaŭ la malfermo de la kongreso, la esperanta flago kraketas ĝoje je l' vento, ĉu apud naciaj standardoj en flagaroj najlitaj sur mastojn starantaj en ĉefaj stratoj, ĉu ĉe l' fenestroj de privatuloj; multaj loĝantoj rigardas kurioze la kongresanojn jam alvenintajn, sur kies brusto vidiĝas fiere la verda stelo; multaj komercistoj algluis sur vitrojn aŭ metis en sian elmontrejon, verdan kartonan stelon

anoncantan, ke « Oni parolas Esperante » ; fine l'apetitdonilo « Zamenhof » aŭ la digestiga likvoro « Esperantine » estas trinkeblaj en ĉefaj kafejoj.

## La malfermo de l'Kongreso.

La sabaton 5<sup>an</sup> de Aŭgusto, je la 8<sup>a</sup> horo vespere, la Bulonja teatro estis plenigita de kosmopolita amaso atendanta religiela leviĝon de l'scena kurteno.

Goje la « Bonan tagon » oni interŝanĝas : « Ah ! Sinjoro, kiel kontenta mi estas konatiĝi kun vi ; kaj via edzino ? kaj viaj infanoj ?... » Kaj estas unu el la plej admirindaj aferoj konstati la feliĉon de homoj, kiuj, koninte sin



POST LA FESTENO

## La parolado de Doktoro Zamenhof.

La kadro de nia Revuo ne taŭgas por plena enpreso de tiu belega parolado, kiu cetere estas enhavita tute en « Lingvo internacia ». (N<sup>o</sup> 17<sup>a</sup> de l' 1<sup>a</sup> de Septembro).

Ni preferas ĝin resumi kaj presi por niaj legantoj ion, kion ili ne trovas en aliaj revuoj, t. e. aŭtografon (memskribaĵon) de l' Majstro.

Post saluto al kongresanoj, kunvenintaj de landoj tiel diversaj, iaj tiel malproksimaj ; al

« glora lando Francujo kaj bela urbo Bulonjo-sur-Mar, kiuj bonvole oferis gastamon al nia kongreso »,

Doktoro Zamenhof aludas la modestecon de la kunveno, kie ĉeestas nek regnestroj nek ministroj. Sed, poezie, li rimarkigas ke tra la aero de la salono, kie kunsidas l' aŭdantaro,

« flugas misteraj sonoj tre mallaŭtaj, ne aŭdeblaj por la orelo, sed senteblaj por ĉiu animo sentema — tra la aero, ankaŭ, flugas misteraj fantomoj ; la okuloj ilin ne vidas, sed la animo ilin sentas : ili estas imagoj de tempo estonta, de tempo tute nova.

La fantomoj flugas en la mondon, korpigiĝas kaj potenciĝas, kaj niaj filoj kaj nepoj ilin vidas, ilin sentos kaj ilin ĝuos ».

Post tiuj frazoj tre aplaŭditaj, Doktoro Zamenhof rememorigas la malpacojn, kiuj kontraŭstarigas homojn ne plu komprenantajn unu la alian, kaj la revojn de miljaroj pri nova interkompreno.

Li elvokas l' esceptan kompreniĝadon inter personoj parolantaj saman nacian lingvon, el kiuj unuj humiliĝas antaŭ la aliaj parolantaj ilian lingvon.

« Dank' al Esperanto, neniu humiliĝas kaj en Bulonjo-sur-Mar kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj. »

Ilia ĉeestado montros al la plej skeptikemaj, ke la horo de l' reciproka kompreniĝado kaj de l' fratigado de la diverspopolaj membroj de la homaro batis ;

« Kaj unu fojon komenciĝinte, ĝi jam ne haltos, sed irados antaŭen ĉiam pli kaj pli potence ĝis la lastaj ombroj de la eterna mallumo malaperos por

Al Vi, ho potenco <sup>sonanta</sup> ~~sonanta~~ mistera,  
Fortego, la mondon reganta,  
Al Vi, granda fonto de l' amo kaj vero  
Kaj fonto de vivo konstanta,  
Al Vi, kun ĉiuj maltrame prezentas,  
Sed ĉiuj egale en koro unu sentas,  
Al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu regas,  
Hodiaŭ ni preĝas.

Al Vi ni ne venas kun kredo nacia,  
Kun dogmoj de blinda fervoro ;  
Sentas nun ĉiu dispart' religia  
Kaj regas nur kredo de koro.  
Kun ĝi, kiu estas de ĉiuj egala,  
Kun ĝi, la plej vera, sen kruco batata,  
Ni staras nun, filoj de l' tuta homaro  
Ĉe Via altaro

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,  
Sed ĝi nun dividas batale ;  
Popolo popolon atakas krucele,  
Frat' fraton atakas sekale.  
Ni, kiu nun estas Vi, forto mistera,  
Aŭtanta la koro de l' preĝo sincera,  
Revenu la paco al la fratuloj ĉiujn  
De l' filoj de Dio' granda homaro !



reciproke de malproksime, troviĝas nun unu kontraŭ la alia, kaj kiuj, sen la plej malgranda malfacilaĵo, daŭrigas buŝe la interrilaton komencitan skribe.

Kaj ilia ĝojo miksiĝas kun dankeco; tial, kiam Doktoro Zamenhof aperas, kaj kiam «La Marseillaise» resonas, estas vera entuziasma «ventego»: aplaŭdoj, krioj, «vivat»-oj (1) aŭdiĝas; ĉapeloj kaj naztukoj moviĝas; kaj tiu, kiu estos ĉiam, malgraŭ sia volo, «la Majstro», videble kortuŝata sidiĝas sur la sceno, antaŭ milo da personoj pretaj por «trinki liajn parolojn». (2)

SINJORINO DANNE.



NE PLU MOVIĜU!

Fotogr. Caudovelle.

ĉiam. Gravegaj estas la nunaj tagoj en Bulonjo-sur-Mar, kaj ili estu benataj!»

Doktoro Zamenhof dediĉas tiam kelkajn grandanimajn vortojn al pastro Schleyer, kiu laboris multe por la ideo de la lingvo internacia ĝenerale. Lia falo ne devas forgesigi liajn laborojn! (3)

Fine al tiuj, kiuj bataladis speciale por Esperanto sin turnas la elpensinto de la lingvo, nomante aparte Einstein, Wasniewski, Trompeter. Tiu tre bela parto de l' parolado estas religie aŭskultata; kaj kvazaŭ unu sola homo, la tuta ĉeestantaro leviĝas, montrante tiel, ke ĉiuj perfekte komprenas, kiam la majstro diras tiujn noblajn parolojn:

«..... Ili mortis korpe, sed ili ne mortis en nia memoro. Mi proponas, estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj, ke ni honoru ilian memoron per leviĝo de niaj seĝoj — Al la ombroj de ĉiuj mortintaj batalantoj esperantistaj, la unua kongreso Esperantista esprimas sian respektan kaj pian saluton!»

Tiu bela ideo estas tuj sekvata de alia neatenditaĵo: deklamo de belega poezio dediĉita al

«tiu nekonata alta morala Forto, kiun sentas en sia koro ĉiu homo».

Ni donas ĉiapude tiun preĝon tian, kia ĝi estis skribata de l' majstro, kaj kiu elĉenigis veran ventegon de aplaŭdoj kaj vivatoj.

Tiu belega parolado estis antaŭita de paroladetoj inter kiuj estis tre rimarkata tiu de S<sup>o</sup> Farjon, Prezidanto de la komerca ĉambro, kiu parolis **ESPERANTE**. Tiu tre grava fakto devas esti diskonigata. S<sup>o</sup> Michaux, kiu prezentis la estraron, parolis laŭ sia kutima sprito; S<sup>o</sup> Peron, urbestro, diris france bonegajn parolojn lerte tradukatajn, flue, de S<sup>o</sup> Paul Boulet, nia kunlaboranto.

AŬGUSTO MONTROSIER.

(1) Franca nomo, per kiu oni nomas la kriojn «li vivu! li vivu!»; oni povus alpreni ankaŭ, eble, «vivuo».

(2) Franca esprimo por diri: atentege aŭskulti.

(3) Ĝi estas enpresota esperante kaj stenografie en la 3<sup>an</sup> n<sup>o</sup> de «Tra la Mondo».

*Ni juris labori, ni juris batali,  
Por rekurigi l' homaron.  
Subtenu nin, Dio, ke lasu nin fali,  
Sed lasu nin venxi la baron;  
Bonacu Vi benon al nia laboro,  
Bonacu Vi forton al nia fervoro,  
Ke ĉiam ni kontraŭ atakoj suvagiĝi  
Nin tenu kuragiĝi.*

*La verdan standardon tre alte ni tenos:  
Ĝi signas la bonon kaj belon,  
Kaj donas gvidon kaj forton al bono.  
La Forto mistera de l' mondo nin benos,  
Kaj nian atakojn ni celon.  
Ni inter popoloj la murojn detruos,  
Kaj ili ekstaros kaj ili cubuos  
Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero  
Ekregos sur tero.*

*Kunigu la fratojn, plektigu la manojn...  
Antaŭen kun pacaj armiloj!  
Kristanoj, hebreoj, aŭ mahometanoj,  
Ni ĉiuj de Ĝi estas filoj.  
Ni ĉiam memoru pri bono de l' homaro  
Kaj malgraŭ malhelpoj, ĉiun koku kaj staco  
Al frata la celo ni iru obstine  
Antaŭen, senfine!*

## Koncertoj kaj Festeno.

Kiel la kunsidoj de l' Kongreso, pri kiuj ni parolos pli malfrue, kiam oficiala raporto estos presita, ili montris la similecon de l'parolo kaj la facilecon de l'esperanta parolado. Aŭdante toaŝtojn aŭ deklamaĵojn, oni sentis ke la lingvo estas plene konstruita: ĝi fluas el la cerbo kaj lipoj same kiel naciaj lingvoj; kaj tiu facileco, tiu taŭgeco de l'esperanto mirevis ankoraŭ pli forte dum la disputadoj de l' kongresaj kunsidoj, en kiuj partoprenis, sen preparo, kongresanoj el la plej diversaj lingvoj. Tion ankoraŭ oni devas rimarkigi kiam oni parolos pri la Kongreso.

Pri la teatraĵoj, ni citos nur la karakterizan prezentadon de «Edziĝo kontraŭvola», bonege tradukita de S<sup>o</sup> Dufentrel, el Bulonjo, ludita de oklingvanaj aktoroj, kiu tute taŭgis por montri la similecon de l'paroloj. Jen estas la difino de

l' roloj, ĉiuj bonege luditaj, kvankam la aktoroj ripetadis kune nur du fojojn.

### EDZIĜO KONTRAŬVOLA,

Dorimeno, <i>filino de Alkantoro.</i>	Fino JUNCK (Italino).
Unua ciganino	Fino CEDERBLAD (Svedino).
Dua ciganino	Sino AVILOV (Rusino).
Sganarelo, <i>amanto de Dorimeno</i>	S <sup>ro</sup> PAUL BOULET (Franco).
Pankraso, <i>filozofo</i>	S <sup>ro</sup> B. MUDIE (Anglo).
Mariufuso, <i>filozofo</i>	S <sup>ro</sup> St Martin (Kanado).
Geronimo, <i>amiko de Sganarelo</i>	S <sup>ro</sup> Ansel (Franco).
Alkantoro, <i>patro de Dorimeno</i>	S <sup>ro</sup> Cogen (Belgo).
Alcidaso, <i>frato de Dorimeno</i>	S <sup>ro</sup> KUCHLER (Germano).
Likasto, <i>amanto de Dorimeno</i>	S <sup>ro</sup> ALLUM (Norvego).



Fotog. Caudeville.

### LA FESTENO ĈE LA KAZINO.

Parolado de S<sup>ro</sup> Michaux, prezidanto de l' Bulonja grupo.

Ĉe la honora tablo, komencante malsupre, sidas:

1. Sinjoro Codorniu (*Hispanujo*).
3. Sinjorino Bolingbroke Mudie (*Anglujo*).
4. Sinjoro Farjon (*Pr. de la Komerca Cambro en Bulonjo*).
5. Sinjorino Zamenhof.
6. Sinjoro Michaux (*Bulonjo*).
7. Doktoro Zamenhof.
8. Sinjoro Bilboec, helpanto de l'Urbestro (*Bulonjo*).
9. Generalo Sebert (*Parizo*).
10. Kolonelo Pollen (*Pr. de British association*).
11. Doktoro Javal (*Parizo*).
12. Sino Sebert (*Parizo*).
13. So Carlo Bourlet (*Parizo*).
14. Aŭgusto Montrosier (*Ĉefredaktoro de «Tra la mondo»*).
15. Sinjoro Moscheles (*Londono*).
16. Sinjoro Borel (*Berlino*).
17. Doktoro Dor (*Liono*).
18. Sinjoro Gaston Moch (*Parizo*).
20. Sinjoro Grabowski (*Varsovio*).
21. Sinjoro Bolingbroke Mudie (*Londono*).
22. Sinjoro Derveaux (*Bulonjo*).
23. Sinjoro Lephay (*Bulonjo*).
25. Sinjoro Pourcines (*Nancio*).

La festeno, okazinta la 7<sup>an</sup> de Aŭgusto, en la Kazino, tre bone sukcesis. Pli ol 350 kummanĝantoj grupiĝis ĉirkaŭ la majstro, kaj entuziasme aplaudis kaj akklamis lin kaj lian alparolon.

Antaŭ aŭ post li parolis multaj riprezentantoj de ĉiuj lingvoj: S<sup>ro</sup> Michaux kiu elokvente trinkis je la sano de D<sup>ro</sup> Zamenhof kaj oficialuloj, dankante france la gazetistaron pro ĝia apogo; S<sup>ro</sup> Bilboec, help-urbestro la sola kiu ne parolis Esperante; (miregiga afero!); S<sup>ro</sup> Boirac t-astas por virinoj kaj S<sup>ro</sup> Aŭgusto Montrosier, nia ĉefredaktoro, levas sian pokalon speciale je l'honoro de Sino Zamenhof, kiu, verŝajne, dum malfacilaj horoj konservis ĉe sia genia edzo la sanktan flameton de l'espero. Intersekve parolis: S<sup>ro</sup> Codorniu (*Hispanujo*), Sino Junck (Italujo) kaj Bergier (*Bulonjo*); Soj Borel (*Berlino*), Mudie (*Londono*), Grabowski (*Varsovio*), Cart (S<sup>o</sup> p. E.) anstataŭ S<sup>ro</sup> de Beaufront, malsana, kies nomo estis tre aplaudata; D<sup>o</sup> Javal, (*Pariz*), Balik (*Praha*), D<sup>ro</sup> Ostrovski (*Jalta*), Carlo Bourlet (*Prez. de l'Pariza grupo*) D<sup>ro</sup> Krikortz (*Svedujo*), pastro Schneeberger (*S. s. p. E.*) kaj abato Peltier (*Dro de Espero katolika*), kiu esperas ke nia lingvo ebligos al ministroj de l' malsamaj religioj pli bone interkonatiĝi kaj interestimi; Otto Simon (*Ung Hradish*), Privat (*Juna esperantisto*), kiu, en parolado el nekomuna elokventeco, aludas ĉiujn, kiuj, ĉu pro malsano, ĉu pro malriĉeco ne povis aliri la kongreson; St-Martin (*Montréal*) alportas al ni grandan fortigon donante la plej kuragiĝajn sciigojn pri esperanta movado en Kanado. Li ankaŭ kortuŝe parolis pri la multaj amikoj, kiuj ŝarĝis lin kaj Sinjoron Beauchemin per siaj deziroj por D<sup>o</sup> Zamenhof.

Fine S<sup>o</sup> Pourcines (*Nancy*), malfermis elokvente la serion de l' paroladoj. Tiu ĉi, komencite en la festena ĉambro, daŭris en la Kazina ĝardeno post faro de l' Grupa fotografajo videbla sur la antaŭaj paĝoj.

Sino DANNE.





IRANTE AL ĈEVALKUREJO.

Fotog. Caudeville.

## Ce la Ĉevalkuradoj de Wimereux.

«Dimanĉon, ni iros al la ĉevalkurejo de Wimereux por plibone interkonatiĝi» diris S<sup>o</sup> Michaux.

Entuziasme, la plimulto de l'Kongresanoj akceptis la proponon; tial multnombra kaj gaja popolamaso akklamas Doktoron Zamenhof, kiam li alvenas ĉe la stacidomon «Tinteleries» por supreniri la specialan vagonaron, kiu veturigos la Esperantistojn ĝis Wimereux.

De la stacidomo Wimereux ĝis la ĉevalkurejo, longa sektantaro postmarŝas Doktoron kaj Sinjorinon Zamenhof, kiuj kuraĝe paŝas antaŭen malgraŭ la varmo de l' suno; kaj ilia alveno meze de l' kurrigardantoj naskas simpatian kuriozecon.

Gesinjoroj Zamenhof kaj la familio Michaux, kiuj ankoraŭ ne havis tempon por tagmanĝi, sidigas ĉirkaŭ tablon preparitan, kaj, kiam ili estos finintaj satiĝi, ilia tablo estos, por multaj, pilgrinejo sankta.

Oni pripensu ke tie estas homoj el ĉiuj landoj, parolantaj lingvojn kaj idiomojn la plej diversajn! Kia ĝojo por ili povi prezenti sin al homo, dank'al kies genio ili povas ĉiuj sin interkompreni reciproke kaj kunfratiĝi. Tie ĉi la simpatia kaj sentmontrema S<sup>ro</sup> Codorniu, el Murcio, parolas kun S<sup>ro</sup> Otto Simon, el Ung Hradish (Moravio) kaj S<sup>o</sup> Beauchemin, el Montréal: ĉiuj tri kunlaborantoj de «Tra la Mondo»; tie S<sup>ro</sup> Blondel el Konakry (Gvineo franca) amike disputas kun S<sup>ro</sup> Ahlberg el Stockholm kaj F<sup>ino</sup> Lawrence el Londono. Simpatiaj rondetoj fariĝas kaj disiĝas; kaj ĉie estas

paca kaj amika interŝanĝo de vizitkartetoj; kaj se ĝi estas sekvata de duelo, estas nur dubatalo per afablaj paroloj.

Ĉiuj ĉiujn famajn Esperantistojn kunvenintajn estas necble; por paroli nur el la kunlaborantoj de «Tra la Mondo» ni donu la nomojn de Borel (Berlino), Seynaeve (Courtrai), Christen (St Andrews), F<sup>ino</sup> Oxenford (Brighton), Pourcines (Nancy), Abato Peltier (Redaktoro de Espero Katolika), pastro Schneeberger (Svisujo), Paul Boulet (Bulonjo), S<sup>ino</sup> Avilov (Tiflis), kiu bonvolos sendi kuriozajn morajojn pri sia nasklando.

Kabe, el Varsovio, aŭtoro de l' terura kaj rimarkinda «Fundo de l' mizero»; Borde (Francujo), Belmont (Varsovio), Jos. Jamin (Bruselo), redaktoro de l' bonega «Belga Sonorilo».

D<sup>ro</sup> Ostrovsky (Direktoro de rusa Esperanto, Jalta), Cart (Francujo), F<sup>ino</sup> Cederblad (Svedujo), Buchanan (Glasgow), Grabowski (Varsovio), kiu faras grandajn teoriojn pri la versoj, kiujn li tre ŝatas kaj lerte verkas; D<sup>ro</sup> Lambert (Londono), Witteryck (Bruĝo), la sindona eldonisto de «Tra la Mondo», kies talenton kaj guston ĉiuj niaj legantoj konas, k. t. p., k. t. p.

Ni povus aldoni nian majstron, Doktoron Zamenhof, ĉar lia «intervjuo» estas vera kunlaboraĵo; kaj, speciale por nia revuo, li skribis la kelkajn liniojn kiuj finas la intervjuon. En tiu ĉi momento li akceptas unujn kaj aliajn kun afablaj paroloj, kaj oni miras la simplecon de tiu homo kaj de lia edzino, tiam kiam tiom da aliaj estus ebriaĵ pro l' sukceso.

Jen li ridas, tre amuzita; kio estas? mi alproksimiĝas kaj aŭdas la subajn spritajn versojn improvizitajn de trio da famegaj aŭtoroj, amike grupiĝintaj tere por glori S<sup>ro</sup>n Alfred Michaux.

Dank' al la diligento de S<sup>ro</sup> Caudeville la lerta fotografisto de «Tra la Mondo» ni povas presi la grupeton de l' kunlaborantoj: S<sup>roj</sup> D<sup>ro</sup> Seynaeve (Belgujo), Kabe (D<sup>ro</sup> Bein el Varsovio) kaj Leo Belmont (S<sup>ro</sup> Blumenthal el S. Peterburgo).

Ili nepre atentas nur al sia laboro kaj ĝin, post kelkaj minutoj, ili deklamas antaŭ S<sup>ro</sup> Michaux, kiu sidas je kelkaj paŝoj de tie, apud S<sup>ro</sup> kaj S<sup>ino</sup> Zamenhof kaj sia familio. Plezure ni presigas por niaj legantoj la lertan versaĵeton, kiu estos la plej taŭga fino por tiu reporteto.

AL S<sup>ro</sup> ALFRED MICHAUX,

*Tie riĉa estas krea fonto  
El kiu fluas vers' por Vi:  
Seynaeve kaj Kabe kaj Belmonto  
Kolektis sin poetoj tri,*

*Kaj rime kantas pri la kredo  
Je certa venk' de la afer',  
Por kiu brava la Alfredo  
Batalas en Boulogne-sur-Mer.*

*Pro la beleco de l' Kongreso  
Tre granda estas nia rav':  
Gratulas Vin pri la sukceso*

BELMONTO, KABE KAJ SEYNAEVE.



Fotog. Caudeville.

D<sup>ro</sup> SEYNAEVE KABE LEO BELMONT

Sin okupantaj je poezia verkado.



# DIVERSAJĜOJ



ATENDANTE LA VILAĜESTRAN PERMESON.

Fot. Braun el Jarosau.

*La Pentekosta-rajdantoj haltintaj antaŭ la bierfarejo de l' fratoj Braun en Jarosau.*

## La Pentekosta rajdado de OTTO SIMON (Ung. Hradish, Aŭstrujo).

Estas kurioza restaĵo de l' mezepoko tiu kavalkado, afable priskribita por « Tra la Mondo » de S<sup>ro</sup> Otto Simon, l'agema kaj lerta aŭstra propagandisto.

Ĉiujare, kiam la naturo eliras de sia unua infaneco, plenforta kaj plensuka, tiam ankaŭ en la homo ekvekiĝas la frenezeta sento de ĝojo kaj forto. Tiu gaja petoleco sin esprimas de antikveco dum florada tempo de rozoj per ia amuza festo. En nia regiono ĝis hodiaŭ sin konservas ĉe la vilaĝanoj la stranga « Pentekosta rajdado ». La Pentekostan dimanĉon, la junuloj de la vilaĝo kunvenas en gastejon kaj elektas knabon ĉirkaŭe dekkvin-jaran, el bonhava familio, kiel reĝon. Lunde oni ornamigadas la reĝan kavalkadon, kiu disponas la plej majestajn ĉevalojn de la loko. La reĝo alivestiĝas kiel knabino. Sur la kapo li portas brilegan florkronon, oblikve ĉirkaŭ la ŝultroj kaj brusto ruĝajn kaj bluajn rubandojn. Lia vizago preskaŭ tute kovrita estas per multkoloraj

drapoj. Inter la dentoj li tenas rozon, ĉar li, dum la tuta procedo, havas malpermeson paroli. Ankaŭ lia blankĉevalo fieras estas feste ornamita. Ambaŭflanke rajdas la adjutantoj kun eltirataj sabroj. Post ili sekvas du senditoj, du elvokistoj, du enspezistoj kaj la sekvantaro. Je la tagmezo okazas unu trumpeta blovo kaj la tuta rajdantaro, ĉirkaŭe dudek viretoj, ekmovadas. Antaŭ la najbara vilaĝo ili haltas kaj la senditoj al la vilaĝestro petas permeson pri enmarŝo. La estro komplezeme konsentas. Sed tuj ĉe la unua domo la aro ree haltas kaj la elvokistoj antaŭen rajdas. La unua ekkrias per laŭta voko « Hilom, hilom! (1) Aŭdu, riĉuloj kaj malriĉuloj; junuloj kaj maljunuloj, ĉitieuoj kaj fremduoj tion, kion mi al vi eksciigos je la hodiaŭa festa tago ».

(1) Aŭdu! Aŭdu!

Nun sekvas improvizataj versoj, per kiuj la elvokistoj flatas la posedantojn de la domo. Tiel, ekzemple:

« En tiu domo loĝas  
[doktoro,  
Al malsanuloj helpas  
[lia bona koro. »

« Antaŭ tiu domo es-  
[tas bela arbo,  
Al posedanto estas  
[majesta barbo. »

« La ĉevalo haltas  
[kun kapdeklino,  
Tie certe loĝas belega  
virino. »

« Ĉe tiu domo floras  
[rozabranĉo,  
Kaj baldaŭ tien venos  
[vigla fianĉo. »  
k. t. p.

La kapo de la kavalkado, dume, forrajdas al la proksima domo; la

unua enspezisto ekparolante vokas: « Ni havas saĝan sed malriĉan reĝon. Sed rabistoj atakis lin en densa arbaro kaj ŝtelis al li tricent ĉevalojn el malplena stalo kaj kvarcent bovojn el malplena bieneto. Ili volis ankoraŭ plu ŝteli, sed feliĉe la reĝo nenion plu posedis. » La unua enspezisto realiras al antaŭaj rajdistoj kaj la dua ekvokas: « Ekspedu nin rapide, ĉar mi havas ankoraŭ longan vojon. Akcelu, alie ni subŝiros la tegmenton kaj

metos ĝin sub la arĝentajn hufojn de niaj ĉevaloj. Ni gvidos ilin en viajn kampojn, kaj detruos la sekalaron. Donu al ni almenaŭ kolbason tiel longan,

ke mi povu per ĝi min involvi trifojn kaj mian saĝetan ĉevalon ankaŭ » Sed tiu admono estas superfla, ĉar ĉiu donas bonkore monon, ŝinkon, ovojn, k. t. p.

Nun oni dankas en ŝerca maniero, por ripeti tiun procedon, antaŭ ĉiu domo, en ĉiu vilaĝo de la cirkaŭaĝo ĝis la krepusko. Poste oni aranĝas en la patra vilaĝo kun la donacoj kolektitaj festmanĝadon al kiu

la reĝa patro, dankante pro la honoro de la elekto de sia filo, liveras barelon da biero.

Bedaŭrinde tiu romantika moro, kiu iam estis disvastigita tra Bohemujo kaj Moravujo, preskaŭ ĉie mortis sub la feraj paŝoj de la moderna kulturo. Nur en la distrikto de Ung. Hradish, tiu moro ankoraŭ konservata estas.

Originale verkita de  
OTTO SIMON.



La Rajdantaro de Meršatic, fotografata por «Tra la Mondo».

## Ĉieaj eĥoj (Sekvo).

### Finujo.

Fina Senato antaŭ ne longe alvoĉdonis pension da 3000 markoj, dum dek jaroj, al poeto Juhani Aho, kaj vivadan renton da 2,200 markoj al skribisto Fr. J.-H. Erkko.

Tiuj dotajoj estas rimarkindaj, ĉar ili elmontras kontentigan ŝanĝon en la politika situacio de l' granda duklando.

Efektive, Juhani Aho havis tenadon tre viglan dum la krizo travivita de sia lando; kaj, kiam senkuraĝiĝo enpenetris la spiritojn, li faris naciecan bataladon, kies rezultatoj estis rapide takseblaj. Pro tio li, tiom kiom J.-H. Erkko, kiu ludis similan rolon, suspektiĝis apud rusaj aŭtoritatoj.

La bonvola ago preparolita permesas elkonkludi, ke paciĝo estas baldaŭ farota en Finujo.

### Cirkaŭ la Bulonja Kongreso.

#### Specialistaj Kunsidoj.

Apud oficialaj kunsidoj de l' Kongreso okazis apartaj kongresetoj de iaj specialistoj.

Tial kundisputis pri temoj aparte pripensindaj por ili: kuracistoj, pacifistoj, katolikoj kaj framasonoj, ĵurnalistoj.

Tiuj kunsidoj estas des pli interesaj kaj atentindaj: ili elmontras, por la granda publiko, ke Esperanto taŭgas de nun ne sole por la ĝeneralaj disputoj sed

ankoraŭ por la specialaj, teknikaj, rilatantaj kiun ajn apartaĵoj; kaj ni opinias ke estos tre bone ilin multe diskonigi.

Aliparte ili montras ke ĉiuj estas interesataj lerni kaj propagandi Esperanton, ĉu simple por disvastigi sian sciencan, siajn opiniojn, k. t. p., ĉu por kontraŭbatali tiujn de siaj kontraŭuloj. Oni ne ĉesu tion diri kaj ripeti.

### Italujo.

#### Direktebla Aerostato.

Dum la unuaj tagoj de la monato julia, gravajn provojn oni faris en Italujo kun la direktebla aerostato « Itala ». — Konstruita laŭ la planoj de S<sup>ro</sup> Chio, la nova aerostato perfekte kondukis, kaj la provoj tute bone sukcesis.

Ni do povas certigi ke ankaŭ Italujo alportos grandan helpon por la sukceso de la grava problemo pri la aera armilisto.

#### Du famaj procesoj.

Antaŭ tri monatoj, komencis la debatojn pri du gravaj kaj famaj procesoj: unue, en Torino, la proceso pri la mortigo de grafo Bonmartini, en Bolonjo; due, tiu kontraŭ leŭtenanto Modugno, en Bitonto, pro la memmortigo de sia edzino.

Baldaŭ finos tiuj du famaj procesoj, kiuj pasiĝis la tutan Italujon.

Grafo A. GALLOIS.

### Oni ne plu povas havigi

plenajn kolektojn de l' bonegaj propagandaj revuoj: *Suno Hispana* kaj *The British Esperantist*. Administracio de *Tra la Mondo* deziras havigi Nojn 1<sup>an</sup>, 12<sup>an</sup>, 13<sup>an</sup>, 14<sup>an</sup> kaj 18<sup>an</sup> de *Suno Hispana* kaj la 5 unuajn de *The British Esperantist*. Oni interŝanĝos ilin kontraŭ duonjara abono de *Tra la Mondo*.

Ankoraŭ unufoje, pro tiu malfacileco plenigi malfrue kolektojn, ni konsilas tuj aboni kaj abonigi « Tra la Mondo. »


### Diversaĵoj.

Oni bonvolu ĉirkaŭstrecki ĵurnalajn artikolojn sendotajn al Redakcio. Fotografajoj ne bezonas esti algluitaj sur kartonon, kio estas pli longa kaj kara por la preparado, pli kara por sendi, kaj kelkfoje maloportuna por la tipografia kopiado.

Oni rapidu sendi kongresajn fotografajojn por la venonta numero.

Ni petegas niajn kunlaborantojn bonvoli tre legeble skribi. Al ĉiuj, kiuj ĝin povas, ni konsilas uzadon de skribmaŝino, kio estas nun tre facila, dank'al la bonega kaj konata maŝino Hammond, la sola kiu havas literojn por ĉiuj lingvoj kune kun supersignitaj.





MAŪZOLEO DE FILIBERTO LA BELA.

Fot. Legay, en Bourg.

## La Brou'a preĝejo. (1)

de M.-J. EVROT.

La Brou'a preĝejo estas fama en la tuta mondo. Oni admiris vidaĵojn de ĝi en la ekspozicio alĝera kaj en tiu de l' kongreso. Ni do pensis prave fari komencante nian diversasciencan rubrikon per priskribo de tiu admirinda arhitekturaĵo.

La Brou'a preĝejo, sidanta je unu kilometro de Bourg-en-Bresse, estas konstruita (laŭ la ordonoj kaj per la elspezoj de Margarito de Aŭstrujo, filino de l'imperiestro Maksimiliano kaj vidvino de Filiberto la Bela, duko de Savojo) de la jaro 1505<sup>a</sup> ĝis ĉirkaŭ la jaro 1532<sup>a</sup>. Tiu fama princino volis plenumi religian promeson faritan de sia bopatrino, Margarito de Burbono. La ĉefaj konstruistoj estis: 1<sup>e</sup> Jean de Paris (Perréal) kun helpo de l' skulptisto Michel Coulombe; 2<sup>e</sup> la flandra Loys Van Boghem kun helpo de l' figuristo Conrad Meyt. Oni povas taksu proksimume la koston de l' konstruaĵo, esprimante ĝin laŭ nia nuntempa mona sistemo, je dudek kvar milionoj da frankoj.

En Brou, aristokrata kaj princa preĝejo, ĉio vidigas la nobelecon kaj la potencecon. Ĉiuparte, la imperiestridino briligis la signojn de sia altrango: blazonojn, insignojn, genealogiojn de la tre altaj kaj multpovaj familioj de Aŭstrujo, de Burgonjo kaj de Savojo. Ĉiuj personaĵoj, kiuj elradias sur la belegaj vitraroj de la ĥorejo aŭ estas tiel mirige

skulptitaj en marmoro aŭ en alabastro, estas vestitaj aŭ ĉirkaŭitaj per la emblemoj de sia ĉiopoveco. Ĉu sur la maŭzoleoj ĉu sur la muroj, la marmoro kvazaŭ fleksebligis por elfloradi, por elpendadi kiel punktoj ŝajne teksitaj per vigla mano de virino; eĉ la sanktejo estas ornamita per interplektitaj amrubandoj (2). La ĉeflitteroj de Filipo kaj de Margarito kaj iliaj profanaj devizoj anstataŭas la sanktajn surskribojn. L'arto viriniĝis por esprimi kune la homan amon kaj la religiajn sentojn.

La plano de la preĝejo estas tre simpla: unu granda centra navo, du flankaj navoj ne kuniĝantaj unu kun la alia post la absido (3), ĥorejo finiĝanta per poligona absido kaj apartigita de la cetera navo per divid-galerio (4), du krucbrakoj, du serioj da kapeletoj ĉe la dekstra kaj la maldekstra flankoj: jen estas ĝiaj ĉefaj partoj; sepdek metroj da longo, tridek kvin da larĝo ĉe la transepto, kaj ne pli ol dudek da alto sub la kojnŝtono (5) de l'arkaĵo: jen estas ĝiaj ampleksoj.

La dispono de la preĝejo estas, same ekstere

(1) La plimulto de tiu artikolo estas resume tradukita el interesplena verko de Jules Baux: « Histoire de l'Eglise de Brou » (Bourg-en-Bresse, 1862). Mi uzis ankaŭ la verkon: « Brou », de Charles Jarrin (Bourg, 1888) kaj paroladon de Joseph Buche: « L'Eglise de Brou et la Renaissance » (Bourg, 1896).

(2) Angle: loveknots; germ.: liebesknoten; france: laçs-d'amour.

(3) Germane: apsis; angle: apsis (multenombro: apsidess); france: abside (funda parto de l'ĥorejo).

(4) Germ.: Charbühne; ang.: rood-loft; france: jubé (galerio apartiganta la ĥorejon de la navo).

(5) Germ.: wölstein; ang.: key-stone; france: clef de voûte.

kiel interne, rimarkinde unueca. La fasado estas interesa kaj rigardinda. Ĝi konsistas el tri partoj kunigitaj: ĉe la centra, estas la pordego superornamita per balustrado kaj statuo de Sankta Andreo, patrono de la Burgonjo.


Multego da detaloj estas dismetitaj sur ĉiuj partoj de la fasado. Tiuj detaloj estas ĉarme desegnitaj kaj neriproĉeble skulptitaj. La genio de la etaĵoj atingis tie sian plej altan gradon. Pordego, fenestroj, rozo (1), trianguloj, balustradoj, apogmuroj (2), pinnoj (3), eĉ la malplenaĵoj lasitaj inter la apogarkoj (4), ĉio estas mirindege brodita; sed eble (ĉu mi devas tion ĉi konfesi?) la luksego iom malutilas al la simpleco de la linioj.

La navo aperas tiel simpla, severa kaj iom nuda, kiel la ceteraj partoj estas elornamitaj kaj enĉizitaj. La kolumnoj estas dikaj, sen kapitejoj, sen toroj (5), kio karakterizas la gotikarton finiĝantan.

Tuj post la transepto, riĉega dividgalerio baras la horejon, kies mirindaĵojn ĝi antaŭsentigas. Ĝi estas kvaŝaŭ pordego, kun tri arkoj, subportataj per kvadrataj kolonoj; antaŭ la ĉefaltaro, malfermiĝas unu pordo el skulptita ligno. Supre, mallarĝa irejo kondukas sur la du flankojn de la sanktejo. Ĝia supra balustrado estas ornamita per sep grandaj statuoj el blanka marmoro.

La posta flanko de la dividgalerio kaj la du unuaj interarkoj de la horejo estas ornamitaj dekstre kaj maldekstre per kverkaj seĝegaroj, skulptitaj de la Bourg'a lignajisto Petro Terrasson laŭ nekredebla delikateco. Ne estas eble tro admirati la lertegan kaj fantazieman artiston paciencie enĉizintan tiujn multegajn niĉojn, tiujn kvindek figurojn de patriarkoj, de sanktuloj kaj de apostoloj. Tie estas riprezentita la tuta historio de l' Malnova kaj de l' Nova Testamento, intermiksita je naivaj aŭ groteskaj scenoj, produktaĵoj de satira kaj liberega fantazio (6).

Ŝajnas ke tio ne estas el ligno, materialo plej malfacile prilaborebla, sed el fero, el filigrano aŭ el punto. Ĉiuj tiuj floraĵoj, tiuj ĉeflitteroj, tiuj amdevizoj,



MAŪZOLEO DE MARGARITO DE BURBONO.

Kl. Do Nodet.

tiuj flamformaj ornamaĵoj ekflorantaj sur la kornico humiligus la plej viglan kaj spertan ĉiziston.

(Daŭranta).

(1) Germ.: rose; ang.: rose-window; france: rose.

(2) Germ.: widerlage; ang.: counterfort; france: contrefort.

(3) Germ.: siebel; ang.: gable-end, gable; france: pignon (latine: pinna).

(4) Germ.: strebebogen; ang.: buttress, flying buttress; france: arc-boutant.

(5) Germ.: pfühl; ang.: torus; france: tore.

(6) Ekzemple, simio rajdanta sur mureto faras grimacojn al monaĥo leganta preĝareton; — sidanta sur najbara mureto, soldato kun malorda barbo ŝajnas amindumi virinon duonsidantan kaj kaŝantan siajn manojn subbraken; — malĉastulino, kun kapo de malvivulo sur siaj genuoj, etendas sian langon al religulo, el kies kapuĉo eliras azenaj oreloj; — monaĥo ĝojege ĉirkaŭprenas felsakon da vino, kiu ŝprucas en lian buŝon, k. l. p.

## “ Pasio ” en Nancy

Laŭ Kanoniko PETIT.

Kanoniko Petit, organizinto de l' rimarkindaj prezentadoj de « Pasio » en Nancy, bonvolis sendi al ni, por « Tra la Mondo », la dokumentojn kiuj ebligis la verkadon kaj la aranĝon de tiuj interesaj paĝoj: Sinceran dankon al nia « privata korespondanto ».

La prezentadoj de « Pasio » en Nancy, kiuj nun okazas, donas fortan impreson de beleco kaj de kredo.

Tiu vidaĵo estas por ĉeestantoj kuraĝigo kaj surprizo. Estas preskaŭ teatro en plena aero, meze de luma ĉirkaŭo. Grandega pentraĵo donas iluzion de vastegaj montoj je flamaĵoj, kies orienta bluo miksiĝas kun la ĉiela lazuro. Dekstre, la antaŭurbo de Jerusalemo ŝtuparigas siajn blankajn terasojn.

Al tiu kunaĵo allumas la varmega Suno de « Vosges », kiu reliefigas tiujn montojn, donas takseblan realecon al hebrea popolo miriga pro vereco en siaj vestoj faritaj el oro kaj radioj, popolo al kiu la lotringa naturo donas, laŭvice, siajn entuziasmajn kaj malamajn eksplodojn. Veraj arboj eliĝas el la planko.

La aktoj plenumiĝas majeste, laŭ antikva ordo. Horo el anĝeloj, gvidata de l' Prologo (Antaŭteatraĵo) kaj Korifo (tre bela voĉo) komentas antaŭ ĉia fazo la venontan agadon. La perioda kaj konstanta apero de tiu harmonia personaro, kiu unuigas ĉiujn la partojn de l'vidaĵo, donas ripozigan impreson; kaj la loko estas solene kvietata.



RENKONTO DE JESUO KAJ DE LIA PATRINO

### Vevey (Svisujo).

La festoj de l' vinberistoj, en Vevey, mirinde sukcesis. Oni ne povas imagi la lukson, la riĉecon de l' kostumoj, la belecon de l' scenoj luditaj en plena aero dum tiuj neforgeseblaj tagoj.

S<sup>o</sup> Hodler, el Genevo, tre konata same kiel S<sup>o</sup> Privat, pro sia agado por disvastigo de Esperanto inter gejunularo, verkas speciale por « Tra la Mondo » artikolon pri tiuj festoj.

### Interesa iniciativo.

Elletero ricevita de S<sup>o</sup> Pr. Borde, el Beaune, ni detranĉis la jenajn liniojn: « Unu el miaj lernantoj sukcese faris la ekzamenon por l' akiro de l' *Atesto pri Kapableco*. Kiel premio, mi proponis unu abonon al « Tra la Mondo ». Tial mi sendas la monon kaj la sekvantan adreson: S<sup>o</sup> Perriaux Maurice, Savigny-les-Beaune (Côte d'Or) ».

Nenio plibone povas pravigi tion, kion ni diris en nia unua numero pri utilo de Esperanto por profesoroj. Ni tre kore dankas S<sup>on</sup> Borde pri lia iniciativo kaj deziras por multaj lernantoj, ke tiu ekzemplo estu imitata.

### Kunlaborado.

Oni bonvolu ne verki tro longajn artikolojn. La revuo ne taŭgas por ili, ĉar ĝi volas paroli mallonge pri tre multaj temoj.

### Béziers (Hérault).

Krom neatendita okazantaĵo, ni daŭrigos la interesan artikolon de fraŭlino Flourens, pri la Arenoj de Béziers, per raporto pri la « Herezistoj » ĵus luditaj je la finiĝo de Aŭgusto, de la sama ŝatata aŭtorino.

### Doktoro Rodet.


tre konata pro sia aktiva partoprenado en la fondaĵo de l' franca kuracista grupo esperantista, opinias ke « Tra la Mondo » devus esti en salono de ĉiuj esperantistaj kuracistoj kaj dentistoj, tiamaniere ke la vizitantoj, atendante sian vicon, povu trarigardi la revuon. La ideo ŝajnas al ni tre interesa, kaj ni konigas ĝin al niaj legantoj, kiuj povus utile ĝin disvastigi inter siaj konatuloj. Kompreneble ĉiuj, kiuj profesie ricevas multajn vizitantojn, povus tiel agi. Eĉ oni povus apudmeti ian lernolibron, zorge elektitan, kiu donus tuj sciigojn pri Esperanto al scienculoj.


### Bibliografio.

Pro migroj de nia ĉefredaktoro, multaj verkoj ricevitaj estas dissemataj en diversajn lokojn. Ni do ne parolas hodiaŭ pri la novaj presaĵoj.

### Frankfurt a Main.

Sinjoro Küchler, el Frankfurt a/Main, proponas elmeti « Tra la Mondo » en ĉiuj publikaj lokoj. Kaj, por komenci, li sub-





R LA VOJO AL LA KRUCSTAREJO (KALVARIO).

Eltirita el «L' Illustration».

Post la majesta eliro de tiu horo, la kurteneĝo malfermiĝinte vidigas prezentaĵojn de l' Malnova Testamento. La sceno de Pasio venas poste, tiel preparita por efiki plej forte.

La dramo plenumiĝas en dek ses aktoj dividitaj laŭ du kunsidoj, matene kaj vespere. La teksto estas simpla kiel decas. Kvieti kaj dolĉa muziko ĝin akompanas.

La prezentaĵoj estas aranĝitaj laŭ senmanka ĝusteco. Kanoniko Petit, kun tute prava gusto, inspiris sin de ĉefverkoj de l' Majstroj de Francujo kaj de Italujo. Li fiksas en sian memoron ilian plej sukcesintan liniharmonion kaj iliajn plej bonajn kolorojn.

Ni donas ĉi sube la «Ceno» (Manĝo), kies oni povas admiri sen ŝanceliĝo la aranĝon, la arton laŭ kiu la aktoroj aliĝis sian vizaĝon, la esprimon de ilia fizionomio. Multe da tiuj aktoroj, kvankam ili estas tre ordinaraj homoj, montras veran talenton, kiun ili ĉerpas, precipe, el siaj kredo kaj amo por sia nedaŭra rolo.

Estas neeble priskribi la riĉecon de l' kostumoj, venigitaj el Jerusalemo, la perfektecon de iaj pentraĵoj, kaj precipe la sunon!

Ĉirkaŭ la 2<sup>a</sup> horo, la ĉielo kaj la fundo unuigas, nedistingeble. Ifoje la radioj rebrilas tra la haroj de Madelino aŭ la vestoj de Mario, du fratinoj poezie beletaj... Ĉiuflanke ĉirkaŭe, la birdoj kantas en la luma atmosfero, kaj estas kvazaŭ malproksima revo!

Oni atendas dek jarojn antaŭ ol revidi tiujn belegajn prezentaĵojn. Ni do tre multe konsilas al niaj samideanoj, kiuj ĝin povos, iri Nancion kaj vidi tiun belan dramon, kiu altiras el ĉiuj flankoj, kaj lasas fortan impreson en la koro kaj la cerbo.

skribis persone ses abonojn, por disdoni ilin en sian urbon. Dankon al ĉiuj kiuj tiel bone komprenas la gravan rolon, kiun povas kaj devas ludi nia revuo, kaj kiuj tiel multe nin helpas en nia entrepreno.



ENO ».

### Bussang (Vosges).

La Popola Teatro en Bussang, festas tiun jaron la dekan datrevenon de sia fondo. Ni detale parolos pri tiu interesa sceno, kiu iĝis modelo por similaj entreprenoj.

Je la 6<sup>a</sup>, 12<sup>a</sup>, 15<sup>a</sup> et 27<sup>a</sup> de Aŭgusto okazis, kun la plej granda sukceso, la prezentaĵoj de «Le Sotré de Noel» kaj «La Pasio de Jeanne d'Arc». S<sup>o</sup> Pottecher, la distinginda Direktoro de l' teatro, verkanto kaj aktoro de l' teatraĵoj, sendis al ni kuriozajn fotografaĵojn, kiujn oni admiris en la Bulonja ekspozicio kaj kiuj formas ŝtufon de baldaŭa artikolo.

### Neesperantista Gazetaro.

La tiel interesa artikolo de nia kunlaboranto, Sinjoro Beauchemin el Montréal, estas presita ankaŭ en la bonega «British Esperantist» por ke, laŭ la deziro de ĝia aŭtoro, Angloj kaj Francoj sciu, samtempe, kiel fariĝis de longe, en Kanado, la konsento Angla-Franca.

Tiu artikolo estas represita parte en la grava revuo franca «Les Annales politiques et littéraires», kies direktoro, same kiel tiu de «L' Illustration» trovis nian revuon bonege presita kaj lukse aldonita.

Jam «Le Gaulois», grava franca gazeto, aludas al la revuo, kiu multe mirigis la administracion.

Efektive, anaro kiu jam havas tian gravan organon estas atentinda, kaj estas tute necese ke, pli kaj pli, la naciaj

gazetaroj atentigas pri Esperanto. Por tio, multe povos la lokaj grupoj.

La atento de la neesperantista gazetaro estas iom direktita al Esperanto, dank' al la Bulonja Kongreso. Tio devas daŭri por ke, kiam komencos la estonta kongreso, la malfacile akiritaj rezultatoj ne estu perditaj, kaj ke, tuj de la komenco de l' kongreso, oni raportu por Esperanto.

Por la trafo de tiu celo, «Tra la Mondo» multe povos se oni scias ĝin uzi. Ja la 2<sup>a</sup> kaj 3<sup>a</sup> Noj enhavas kaj enhavas fotografaĵojn pri la kongreso kaj la vojaĝo en Anglujon. Tiuj numeroj povos esti tre utile montrataj al loka gazetaro, de la grupestraroj; tiu montrado memorigos la kongreson kaj estos temo por preparoladoj multe pli fruktodonaj, precipe kiam oni havas pruvojn en la manoj, ol skribaĵoj aŭ iaj raportoj. Oni vidas, per tiu nova ekzemplo, ke pli kaj pli «Tra la Mondo» iĝos valora helpo por la propagando, grava kunlaboranto por ĉiu fervora propagandisto.

Ni do, sen la malplej konsciencdubo, instigas ĉiujn helpi ĝian disvastiĝon.

### LASTHORE.

Ĝus finiĝis longa kaj terurdona prezentaĵo; granda teatraĵo milita kaj ŝipa! kies scenoj estis ĉiam kaj ĉiam sangokovritaj, dum pafado kaj dolorkrioj ne ĉesis bruegi. Kaj en la kulisoj, funebroj multiĝis kaj larmoj, larmoj de rusaj kaj japanaj edzinoj kaj gefiloj riveriĝis. Povu la mondo ne plu ĉeesti tian teruran spektaklon!

A. M.



LEŬTENANTO COTTENEST (NUN KAPITANO) INTER TUAREG'AJ ESTROJ.

## Pri Marokujo — « Sahara » aj Rotoj. De KAPITANO ?

La Marokaj okazantaĵoj altiras la atenton pri la Algeria-Maroka landlimo kaj la speciala policana rolo ludata de Francujo en tiu regiono. Sajnigis al ni interesinde paroli pri la kvin enlandaj rotoj, kiuj speciale defendas la oazojn (« Gurara » — « Tuat » — « Tidikelt » — « Saŭra » — « Kolomb »).

Unu el la plej distingindaj oficiroj, kiu militis en tiuj ĉi bonegaj militantaroj, bonvolis skribi speciale por « Tra la Mondo » la kelkajn sekvantajn liniojn.

Niaj « Sahara » aj militantaroj estas, ja, mezaĵo inter kamelmilitistoj organizitaj je la unua horo, kiam ni al militis Alĝerion, kaj la regimentoj de enlandaj arabaj tirajloroj.

Generalo « de Négrier » estas tiu, kiu opiniis ilin necesaj Post unua malfeliĉa eksperimento, dum la 1890<sup>a</sup> jaro, la unua roto estis organizata dum 1894<sup>a</sup>, de kapitano « Pierron », nuna estro de « Kolomb » a rondo (Orana Sudo). La komencoj estis malfeliĉaj, sed dank' al la energio de mirinde elektitaj estroj, oni fondis tiun militunuecon, el kiu eliris la « In-Rhar » aj herooj, « Deghamcha » (« Tidikelt », 1900<sup>a</sup>), « Sahela » (« Gurara », Septembro 1900<sup>a</sup>) « Charuin » kaj « El Hammar » (Marto 1901<sup>a</sup>).

Arabe vestitaj: kamelfelaj piedvestoj, katunaĵaj vestoj, ruĝa araba ĉapeto (aŭ ŝeŝia); per blanka arabtiksaĵo vualita, du burnusoj, unu blanka kaj unu griza, tiuj ĉi novaj regulaj militistoj havas, kiel militan kostumon, nur ruĝan zonon sur kiu vidiĝegas la bajonetglavinga zono. Ili armilo estas la 1890<sup>a</sup> kavaleria karabeno kun 120 kartoĉoj en tri kartoĉujoj.

Nutrante sin kiel la araboj loĝantaj en ĉirkaŭantaj landoj, el kiuj ofte ili devenas, ili estas pretaj por marŝi dum ĉiuj sezonoj; kaj marŝi kvindek kilometrojn ĉiutage, dum multaj tagoj sinsekvaj, havante nur malgrandan provizon je faruno, portata de facilmovala veturilaro, tia estas ilia kutima irado.

Por utiligi ilin, kiel eble plej bonmaniere, oni faras ilin kamelmilitistoj, aŭ rajdistoj, aŭ almenaŭ rajdantaj piedsoldatoj.

Ni havas ankaŭ niajn « Sudanajn » kaj « Senegalajn » kamelmilitistojn de « Agades » kaj de l' « Tchad », kun nia kolonia infanterio.

En « Mauritano », kun bedaŭrinda « Coppolani », ili ĉiam glorge militis, oferantaj sian vivon, tiel gaje kiel niaj francaj soldatetoj, por lando, kiun nur kore ili konas; sed Francujo estas ilia nova patrujo, kiu por ili agas kiel por siaj propraj infanoj.

Inter cent elektante tiun ĉi ekzemplon, ni finos per sekvanta citaĵo ĉe l'ordono de la 19<sup>a</sup> korpuso, kiu sola pli diros, ol ĉiuj merititaj laŭdoj, kiujn ni povus prave malŝpari por niaj Sahara'aj militantaroj.

### Generala Ordono n<sup>o</sup> 17<sup>a</sup> de la 15<sup>a</sup> de Julio 1902<sup>a</sup>.

Kontraŭ — rezzu (1) de leŭtenanto « Cotteneat », de l'kunigita lando « In Salah » en « Hoggar » on.

« Mohammed ben Sliman ben Merizig », mohazeni el oulad zid (chaamba el Ouargla) vidinte « Tuaregon », kiu celis leŭtenanton « Cotteneat », ĵetis sin antaŭ tiun ĉi oficeron kaj estis grave vundata. Li rifuzis eliri el fajrigo linio, kie li daŭrigis sian servon ĝis li svenis ».

Oni ne scias tion, kio estas plej admirinda: aŭ la militistoj kapablaj plenumi tiajn sindonajn agojn, aŭ tiuj, kiuj sciis ilin inspiri.

« LA « SAHARA » ANO  
Esperantigis Diffre Paul, el Konstantino

(1) Rezzu, araba vorto signifanta rabadon faratan de rajdantoj malamikaj.



# FELIETONO

Malgraŭ la malfacilaĵoj kaj la malĝojoj de l' nuna horo, niaj fervoraj amikoj en Vladivostoko ne forlasas Esperanton.

En la mezaj tagoj de Aprilo ni ricevis de ili, inter aliaj dokumentoj por la Alĝeria ekspozicio, la sekvantan nepresitan verkon, kun la afabla permeso ĝin publikigi.

La granda famo de l' aŭtoro de tiu skribaĵo, verkita por konkurso de l' Vladivostoka filio de l' Societo « Espero », de Sinjoro Kazi Girej, igos certe ĝian legadon tre interesa por niaj legantoj.

## La Rememoroj. de KAZI GIREJ (Manĵurio).

« Nia diligenta kolegaro  
En laboro paca ne laciĝos  
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro  
Por eterna ben' efektiviĝos... »

EL « ESPERO ».

La aŭtoro dediĉas tiun-ĉi artikolon al la aŭtoro de nia lingvo

Jam la trian monaton mi kuŝas en mia lito, ĉar mi estas malsana.

Mi kuŝas senmova, pala, kiel malvivulo, kaj nur mia vizaĝo montras, ke mi estas ankoraŭ viva. Miaj okuloj brulas per la fajro de sufero, kaj miaj buŝo kaj frunto estas konvulsie sulkitaj pro la dolor-turmentoj.

Mi estas malsana per la brulumo de koro kaj ĉiufoje, kiam mia brusto levigās por spiri, mi sentas kvazaŭ la tranĉiloj enirus en ĝin kaj en la koron.

Dio mia ! kiam finiĝos tiu-ĉi terura stato !...

Mi pensas sensone, kaj la larmoj fluas el la okuloj...

La lastajn tagojn mi prozis ofte, preskaŭ ĉiutage; sed miaj nervoj kaj mia animo fariĝis tiel malsanaj, kiel mia korpo.

Mi ne povas paroli multe, ĉar mia brusto estas tro malforta, kaj tial, la plej grandan parton de la tago, mi silentas. La doloro preskaŭ tute ne permesas al mi dormi, kaj mi pensas tagojn kaj noktojn, kaj miaj pensoj estas senfine malgajaj.

Mi imagas al mi la vivadon de mia familio post mia morto, kaj la teruro ĉirkaŭbrakas min...

Mi prezentas al mi mian malgrandan, trijaran filineton malsata, pala, malbone vestita, loĝanta pro la mizero, pro la manko de mono en la malgranda, kruda, sufoka loĝejo.

Mia malsana, servema imago laboras senĉese kaj mi vidas la vizaĝeton de mia filino kun tiu esprimo de l' antaŭtempa maljuneco, kiun la mizero metas sur la vizaĝojn de l' infanoj-mizeruloj kaj mi denove ploras...

Mia patrino alproksimiĝas al mi; karesante, ŝi metas sian molan, varman manon sur mian frunton, kaj kun malforta rideto demandas min : « pro kio vi ploras ? kredeble denove vi elpensis ion teruran ? » kaj ŝi penas trankviligi min.... Vane !... Trankviligi povas nur tiu, kiu mem estas trankvila kaj vigla, kaj mi vidas tra la arta rideto de mia patrino, mi sentas, ke ŝi mem ne estas trankvila.

Tamen la forto de patrinaj karesoj estas tiel granda, ke mi baldaŭ sentas, kvazaŭ ŝia mano forprenus de mi miajn suferojn korpajn kaj mian animan ĉagrenon, kaj mi ĉesas plori kaj nur deziras, ke mia patrino restu apud mi pli longe kaj ne forprenu de mi sian manon; ŝajnas al mi, ke ŝia mano tenas min tie-ĉi, sur la tero, helpas al mi vivi, kaj io simila al la feliĉo eniras en min, kaj mi rigardas la patrinon, kiel ian Anĝelon.

La doktoro vizitadas min ĉiutage po du fojoj: matene kaj post la tagmanĝo. Jen li venas; malgrand-kreska, fortika, blankhara kun grizbluaj okuloj, vivaj kaj tranĉaj, kaj kun la agia nazo, la doktoro estas ĉiam egalhumora. Kiel ĉiam, li demandas min « Nu, kion novan vi havas ? — « Nenion, doktoro; nek pli bone nek pli malbone... » La doktoro sulkiĝas la frunton, rigardas penseme mian liton kaj, post mallonga silento, li komencas la medicinan ĉirkaŭrigardon: li aŭskultas miajn bruston kaj koron, li palpas per la manofingroj miajn ŝvelintajn, pro la akvomalsano, piedojn, kiuj dank' al rondforma ŝvelo, prezentas strangan kontraston kun la terure malgrasa brusto kaj tute senmuskolaj manoj; li mezuras mian temperaturon kaj fine demandas min pri miaj dolorsentoj, mia spirado kaj mia apetito. Mi respondas, kaj la doktoro aŭskultas min kun tia vido, kiu kvazaŭ montras, ke li sciis jam antaŭe ĉion responditan, kaj demandas min nur por la pli forta konvinkiĝo, kaj ke ĉio iras en mia malsano tiel, kiel ĝi devas iri...

Fininte la medicinan parton de sia vizito, la doktoro trairas al la privata interparolo kaj diras al mi: « Kial vi estas ĉiam tiel malgaja ? pri kio vi pensas ? vi fortigas mem vian malsanon per via propra imago. Legu ion amuzan kaj, se vi ne povas legi mem, petu vian patrinon, kaj ŝi, certe, legos por vi kun plezuro ion facilan, gajan... Aŭ petu ludi por vi je la fortepiano ».

Mi nenion rediras al la doktoro, ĉar mi estas iom lacigita kaj ne deziras disputi.

Mi jam provis legi kaj aŭskulti la muzikan ludadon, kaj nek tio, nek la alia estis por mi agrablaj; eĉ post la unuaj agordoj muzikaj mi eksentis, ke mi tuj ekploros, kaj mi ekkriis : « sufiĉe, sufiĉe, pro Dio... » (Daŭronta).

KAZI GIREJ.

# MIKSAĴOJ.

## Por la propagando.

### ESPERANTO (FINO).

Kio'n oni dev'as far'i por lern'i Esperant'o'n?

O! tio est'as tre simpl'a. Vi jam vid'is, ke ĝi est'as facil'eg'a. Aĉet-u, po kelk'e da mon'o, gramatik'o'n kaj vort'ar'o'n; post'e abon'u je la esperant'ist'a revu'o propagand'a de vi'a land'o. Ekzist'as nun en ĉiuj land'o'j unu tia revu'o.

Ĉiu est'as tre valor'a por la hom'o'j parol'ant'a'j la naci'a'n lingv'o'n, en kiu ili est'as part'e pres'at'aj.

Kiam vi est'os pli kler'a'j, vi pov'os abon'i je

bon'a'j tut'e inter'naci'a'j revu'o'j, inter kiu'j mi atent'ig'as vi'n pri « Tra la Mondo » kiu en'hav'as fak'o'j'n por ĉiuj kategori'o'j da leg'ant'o'j, eĉ por la tut'e ne'sci'ant'o'j tia'j, kia vi est'is.

Ĉar ŝajn'as al mi, ke jam vi est'as iom sci'ant'o, tio est'as sci'ont'o baldaŭ. Mi do las'as vi'n, esper'ant'e ke post ne long'e vi leg'os tut'e sol'a.

Kaj tio, dank' al mi, kiu do taŭg'as egal'e por la tut'e komenc'ant'o'j; ĉar mi instru'as amuz'ant'e.

Ĝis la re'vid'o.

TRA LA MONDO.

### REGULARO DE NIAJ KONKURSOJ.

1<sup>e</sup> Ĉiuj amuzajoj, problemoj kun siaj solvoj, proponotaj en « Tra la Mondo », devas esti sendataj al sinjoro Brunet Ch. 59 cours Victor Hugo, Bordeaux, kiu bonvolis preni sur sin la redaktadon de la paĝo « Miksaĵoj ».

2<sup>e</sup> Krom esceptoj speciale dirotaj, la solvoj devos esti senditaj al s<sup>ro</sup> Brunet en maksimuma templimo da 15 tagoj post la ricevo de la Revuo.

La komparo de l' poŝtmarkoj ebligos kontroli ĉu tiu ĉi kondiĉo estas plenumita.

Tiel agante, ĉiuj divenintoj, eĉ la plej malproksimaj, povos sendi la solvojn de ili trovitajn.

3<sup>e</sup> Divenintoj estos ordigataj kvaronjare laŭ la nombro de ĝustaj solvoj senditaj de ĉiu, kaj premioj estos donacataj al la plej sagacaj.

4<sup>e</sup> Por iaj konkursoj, aparte gravaj, oni aljuĝos specialajn premiojn.

### PROBLEMO 1<sup>a</sup>. — KAJ 2<sup>a</sup>.

Estos lotataj inter divenintoj de la du problemoj, post ricevo de ĉiuj solvoj:

1<sup>e</sup> Jara abono je la « Tra la Mondo ».

2<sup>e</sup> Tre bela albumo por ilustritaj poŝtkartoj.

3<sup>e</sup> Duonjara abono je « Tra la Mondo ».

4<sup>e</sup> Boteleto da parfumo « Espero ».

Plue, ĉiuj divenintoj estos rajtigataj por la kvaronjara ordigo.

### PROBLEMO 3<sup>a</sup>.

Trovi la nomojn de trinkaĵoj anstataŭigitaj per la sep punktlinioj. Ĉerpi la literojn signitajn de dikaj punktoj kaj kunigi ilin por formi la nomon de la trinkaĵo enhavita en la rompita botelo.



### PROBLEMO 4<sup>a</sup> (DE CH. BRUNET).

P L U G I  
D R A Ŝ I  
K A L K A

Austataŭigu la literojn per la ciferoj 1 2 3 4 5 6 7 8 9 0. Sumigu kaj trovi 100.000. Kian valoron havas ĉiu litero.

### PROBLEMO 5<sup>a</sup> (DE CH. BRUNET).

Per la literoj de l' sekvantaj vortoj:

Kuro — kulo — kanalo — pino — loko.

Kaj unu alia litero aldonita je ĉiu, formu novajn vortojn, ĉiuj homkorpaj. La unuaj literoj de tiuj novaj vortoj montros sesan homkorpan vorton kaj la literoj aldonitaj montros lecionaron pri ia ajn temo.

### AMUZAĴOJ (DE ESP. 10.072).

Tajloro diras al sia servanto:

— Ĉu vi portis la fakturon (kalkulon) al la senatano?

— Jes, sinjoro.

— Kaj kion li diris?

— Li diris, ke mi forportu ĝin al la diablo!

— Kaj kion vi faris?

— Jen ĝi estas. Mi reportas ĝin al vi.

Sinjorino, mi partoprenas vian bedaŭron. Vi perdis plej estimindan edzon.

— Jes, Sinjoro, tiu perdo estas por mi dolorega. Mi scias, ke mia edzo estis tre bona, sed mi ne scias kia estos la venonta.

— Johanino! Johanino!

— Kion vi volas, sinjorino?

— Kion vi faras?

— Nenion.

— Kaj vi, Petrino?

— Mi helpas Johaninon.

### ATENTU!

Sinjoro Ch. Brunet petas, eĉ petegas, la divenintojn ke ili sendu ĉiujn solvojn poŝtkarte kaj nur poŝtkarte.

Li agas tiel por la klasigo de la solvoj: maniero pli simpla kaj facila ol letere.

Li rifuzos kaj ne presigos la nomojn de la personoj kiuj forgesos tiun ĉi avizon.

Letere li ricevos nur klarigojn pri problemoj aŭ proponotaj problemoj. Li ankaŭ avertas ke ĉiuj problemoj eble ne estos presataj, ĉar li elektos la plej taŭgajn aŭ la plej bonajn inter tiuj, kiujn li ricevos.

Sendintoj — sendantoj — sendontoj legu atente tiujn ĉi liniojn.

# Ĝhoj kaj malgranda korespondado.

## Miraklo!

Antaŭ nelonge, Alĝero estis revoluciata de kvazaŭ faranto de mirakloj, proklamanta ke li vidis Kriston, kaj ke li sentas en si forton por kuraci ĉiujn malsanojn. Lia domo estis sieĝata de miloj da personoj, videmaj aŭ malsanaj; sed, ve! li sukcesis fari nur malesperintojn kaj nenian miraklon! La fama miraklonaskanto! devis ĉesigi siajn ekzercojn, danĝerajn por la spiritoj, kaj ankaŭ por la najbaraj bienoj tute difektataj de lapopolamaso.

## Terura malsano.

Ĝi ne ŝajnas tre grava kaj tamen kiom da malhelpoj alportas la malagraba astmo al personoj ĝin suferantaj; Kiom da sportistoj devas forlasi sian plej ŝatatan plezuron pro malfacila spirado.

Al niaj amikoj ĝenataj de tiu enua malsano ni konsilas la « Remède d'Abyssinie Exibard » uezblan pudre, cigarede aŭ je formo de folioj por fumi kvazaŭ tabakon en la pipo. Tiu kuracilo, ordonata de ĉiuj kuracistoj, sensuferigas kaj resanigas milojn da malsanuloj ĉiujare. Sin turni al sinjoroj H. Ferré, Blottière et Cie, 102 Rue de Richelieu, Paris.

## Konsento angla-franca.

Samtempe kiam la esperantistaj kongresanoj estis akceptataj en Folkestone kaj Dovero, okazis la akcepto de l' francaj

maristoj de l' Reĝo Eduardo VII<sup>a</sup> kaj de l' anglaj aŭtoritatoj. La fama ilustrata revuo franca « L'Illustration » sukcesis havigi tre kuriozajn vidaĵojn de l'ensipiĝo de Reĝo Eduardo VII<sup>a</sup> sur la francan militŝipon « Masséna ».

Tiu belega revuo havas cetere la « rikordon » de l' rapida informado, por kiu ĝi ofte plenumas mirindaĵojn.

## Hino.

La ĥinaj korporacioj malpermesas komercon kun Amerikanoj. Tiu « perŝingra montrado » estas konsekvenco de amerikanaj leĝoj malpermesantaj al ĥinoj restadon en Unuiĝitaj Statoj. Oni scias, ke tiuj leĝoj estas deciditaj pro malkareco de l' manlaboro de l' ĥinoj, kiuj konkurencas tiel amerikanajn laboristojn.

## La vinberistaj festoj en Vevey.

Respondo al S<sup>o</sup> J. C. Glasgow: Jes tiuj famaj festoj okazis kaj havis la plej grandan sukceson. Doktoro Dor, nia konata kaj afabla samideano donis al ni la plej interesajn sciigojn pri ili, kiujn li ĉeestis antaŭ la Bulonja kongreso.

Vi povas trovi vidaĵojn kaj muzikon luditan dum la festoj, en « L'Illustration » kaj « Les Annales politiques et littéraires » kiuj enhavis multajn interesajn vidaĵojn de tiuj neoftaj kaj rimarkindaj festoj; ankaŭ en 3<sup>a</sup> N<sup>o</sup> de « Tra la Mondo ».

## Profitoj oferataj de « Tra la Mondo ».

« Tra la Mondo » volas ne sole utili propagandon, ĝenerale, sed ankoraŭ volas helpi propagandistojn, ofte haltigitaj de manko da mono. Kiu varbos ses abonojn ricevos sepan senpage, t. e. valoron da 8 frankoj, kaj tiel *po ĉiu serio da ses abonoj*.

Plie GRANDA KONKURSO estas de nun malfermita. Tiu ajn, izolulo aŭ grupo, kiu varbos plej grandan nombron da abonoj ĝis la 31<sup>a</sup> de decembro (almenaŭ 30) ricevos 50 frankojn mone. Kun kalkulante la antaŭan profiton, estas do PREMIO DA 90 FR., tre utilaj por la propagando.

Oni jam legis pri aliaj konkursoj.

## Abonkosto.

Malgraŭ ĉiuj tiuj profitoj, la Revuo kostas NUR 8 frankojn. Ni deziras, plie, rapide plidiki = kaj plibonigi la Revuon, kaj plimultigi la ilustraĵojn. Tio dependos de l'Esperantistoj

GRAVA AVIZO. — Ofte, pro manko da antaŭpripensoj, multaj personoj ne abonas tuj novajn revuojn kaj poste estas devigataj pagi altpreze la unuajn numerojn. *Pri tio oni povas legi en ĉiuj Revuoj.* Atentu pri tio:

UNUAJ NUMEROJ de « Tra la Mondo » altvalorigos. — Rapidu aboni por la tuta jaro aŭ almenaŭ por la tri unuaj numeroj enhavantaj plenan ilustritan raporton pri la Bulonja kongreso.

## ABONMENDILO (Modelo) (1)

Mi abonas « Tra la Mondo »

Nomo kaj baptonomoj.....

Profesio.....

Adreso.....

Sendita de(2).....

(1) Skribi tre legeble kaj sendi tiun mendilon, en afrankita koverto, al « Administranto de Tra la Mondo, 15, Boulevard des Deux Gares, Meudon (S et O), France ».

Por eviti malsimplajn kalkulojn, ni plenumos nur mendojn akompanatajn de mono (vidu ĉi sube).

(2) Se vi ne abonas propramove, ne forgesu tie ĉi aldoni nomon de persono, kiu abonigis vin. Tio estas tre grava, por ke ni povu enskribi la rajtojn de ĉiu je la senpaga abono aŭ je la premio de nia konkurso. Ni, efektive, nepre volas respekti tiujn rajtojn.

**Jara abonkosto:** En ĉiuj landoj 8 fr. = 6 \$ 6 p = 3 rubloj = 6 markoj 45 pf. = 1 dol. 52 cents = 3 hol. fl. 80 cents = 5 skand. kronoj 67 öre = 8 aŭstro-hungaraj kronoj.

**Unu numero, afrankita, 0 f. 75 centimoj. — Kvaronjara abono: 2 f. 25 c.**

Eĉepte, por pago de specimenoj, oni akceptas poŝtmarkojn — *po 3/4 de ilia valoro* — sed nur el landoj ne havantaj internaciajn mandatojn.

## GRAVA AVIZO.

Pro niaj altaj elspezoj, kiu ne volos nek aboni, nek pagi tiun numeron kiel supredirite, estas petegata bonvoli ĝin uzi por varbi almenaŭ unu abonanton, aŭ ĝin resendi al administrejo.

En raison de nos frais élevés, celui qui ne voudra ni s'abonner ni payer ce numéro comme il est dit ci-dessus, est instamment prié de s'efforcer de l'utiliser pour recruter au moins un abonné, ou de renvoyer le numéro à l'administration.

# Anoncoj kaj reklamoj.

« Tra la Mondo », irante en ĉiujn landojn, enpresos anoncojn ĉiulingvajn. Sed la komerca publikigo per Esperanto estas, nedube, la plej taŭga.

**PROFITO DE LA ESPERANTA PUBLIKIGO.** — Ĝi prezentas grandegan profiton kompare je la publikigo per naciaj lingvoj: kontraŭe je tio, kio ofte okazas pri tiu lasta, ĝi estas ĉiam legata, estante legada ekzercio, kaj lernado (pri la teknikaj vortoj) por la adeptoj de la helpa lingvo.

Plie, ĝi donas eniron en ĉiujn landojn al komercistoj ĝin uzantaj.

Ni do tre atentigas la komercistojn pri la utilo de l'esperanta publikigo.

## Prezo de nia publikigo.

Anoncoj	De 1 ĝis 3	1 fr.	ĉiulinie.
	3 ĝis 6	0 fr. 90 c	»
	6 ĝis 12	0 fr. 75 c	»
Paĝoj	1 paĝo	140 fr.	
	3 paĝoj ĉiujare	125 fr.	
	6 paĝoj almenaŭ, ĉiujare	100 fr.	

**Reklamoj.** — 3 fr. ĉiulinie, kun traduko.

Linimezurilo 7-punkta, kolono da 6,5 centimetroj.

**Avizo.** — Por publikigo en lingvoj aliaj ol la franca kaj Esperanta, estas rekomendate sendi klišaĵojn, aŭ almenaŭ presitajn tekstojn. La klišaĵoj estas devigitaj por la lingvoj ne uzantaj, tipografie, la francajn preslitterojn.

## IUS APERINTA!

FRANÇOIS COPPEE

## Unua Ĉapitro

de miaj memorskriboj

ESPERANTIGITA DE

AUGUSTE MONTROSIER



PREZO: 75 CENTIMOJ

PARIS

ALPHONSE LEMERRE, ELDONISTO

21-23, PASSAGE CHOISIEU, 21-23

M. DCCCXV

Ĉarma verketo de l' fama franca akademiano, kun antaŭparolo tute aproba por Esperanto.

Ĉe « Tra la Mondo ».

Belegaj propagandaj poŝtkartoj kun vidaĵoj de Alĝerio;  
I fr., afrankite, ĉiu dekduo.

Propagandaj poŝtkartoj de « Tra la Mondo », fr. 1,50 ĉiu cento.

ĈE « TRA LA MONDO ».

## AL BULGARAJ ESPERANTISTOJ KAJ ABONANTOJ DE « RONDIRANTO ».

### ATENTINDA AVIZO.

Bedaŭrante multege esti devigita ĉesi eldonon de « RONDIRANTO », la Sekretario de l'klubo de Plovdiv, Sro G. P. Oreškov dezirus, ke la fervoraj Bulgaraj Esperantistoj kaj la abonintoj de Rondiranto ne estu senigitaj je ilustrata gazeto. Laŭ lia peto ni sendas, serie, specimenojn de nia revuo al abonintoj de l'ĉesinta Rondiranto. Laŭ la vortoj mem de Sro Oreškov, « la nova revuo ĉiumaniere tre bone anstataŭos « Rondiranto », enhavonte artikolojn pri Bulgarujo kiel pri ĉiuj aliaj landoj, kaj pri ĉiuj temoj; la legantoj estos do ĉiam kontentaj kaj ne bedaŭros aboni **TRA LA MONDO** ».

Oni bonvolu sendi abonpagon al nia riprezentanto, Sro G. P. Oreškov, en Plovdiv, Bulgarujo, aŭ senpere al « Administranto de Tra la Mondo, 15 Boulevard des Deux Gares, Meudon (S. et O.), France.

Kiuj ne deziras aboni estas petataj resendi la specimenojn al l'administranto. Ni tre atentigas pri la profitoj oferataj al la favorantoj de « TRA LA MONDO » (3<sup>a</sup> paĝo de la kovrilo).

## BULONJA KONGRESO.

Ĉiuj kiuj deziras memoraĵojn de nia grava kongreso bezonos nur sin turni al la lerta fotografisto, speciale komisiita por akompani DOKTORON ZAMENHOF kaj la kongresanojn dum liaj migradoj.

Sro Candevelle, aŭtoro de l'interesaj kongresaj fotografajoj presitaj en tiu numero de « TRA LA MONDO » ricevis viziton de Dro Zamenhof je la fino de l' kongreso kaj faris portreton plenvivan de l'majstro. Jen estas la kostoj de tiu portreto, tute rekomendinda pro ĝia simileco:

Albumformato	{ brila	2 frankojn.
	{ nebrila	3 »
Formato 30,40 centimetrojn,		» 10 »

Sro CAUDEVELLE, 7, Rue des Carreaux, Boulogne-sur-Mer (Pas de Calais) France.

Oni bonvolu sendi monon kun la mendoj.

## L'ILLUSTRATION

La plei bela, la plej bone kaj rapide sciigata el ĉiuj franclingvaj ilustrataj gazetoj (ĉiusemajna).

Multaj senpagaj aldonoj: muzika, arta, literatura, k. l. p.

Jara abono } Francujo: 36 fr. (9 fr. por unu kvaronjaro)  
} Fremdlandoj: 48 fr. (12 fr. por unu kvaronjaro.)

Sin turni 13, RUE ST GEORGES, PARIS.

## SKRIBMAŝINOJ HAMMOND

La solaj provizitaj per supersignitaj literoj.

Petu senpagaj katalogon: P. CASTELLI, 9, RUE LE PELETIER, PARIS.

## La malgrandaj anoncoj de « Tra la Mondo ».

Tra la Mondo organizas « anoncetojn » dank' al kiuj ĝiaj legantoj povos facile interkorespondadi. Tiuj anoncetoj enhavos du kategoriojn, t. e.:

- 1<sup>o</sup> LA ANONCETOJ PRIVATAJ, pri servproponoj, petoj por oficoj aŭ laboroj (lecionoj, kursoj, geservistoj, k. t. p...); La proponoj por interŝanĝoj (poŝtkartoj, poŝtmarkoj, etaĵoj, sportoj, k. t. p...)
- La luigoj da apartamentoj, domoj, k. t. p.

2<sup>o</sup> LA ANONCETOJ KOMERCAJ, rilatantaj ĝenerale la vendojn de laboraĵoj, produktoj, aŭ specialaĵoj vendataj de komercistoj.

### TARIFO.

Por privataj anoncetoj: 0 f. 15 ĉiuvorte por abonintoj kaj 0 f. 30 por neabonintoj.

Por komercaj anoncoj: 0 f. 50 ĉiuvorte, por ĉiuj gelegantoj

1. — Sro Paul Henry deziras aĉeti Renault 4<sup>1/2</sup> aŭ 8-9 ĉ. Respondos nur je vera favorpropono. Sin turni 34, Rue Troyon, Sèvres, (France).
2. — Sro Vrtel Francisko, termezurista oficisto en Bruno, Elisabetpl. 4, Aŭstrio-Moravio, interŝanĝas belajn koloritajn poŝtkartojn. Afranku per malgrandaj poŝtsignoj.
3. — Kapitano Capé, 74, Faubourg Banner, Orléans, ricevos danke, por siaj soldatoj, ĉiujn ajn legindaĵojn, france presitajn.
4. — Fraŭlino Jehanne Groujon, 18, rue Hanneloup, à Angers (Maine et Loire), France, sendos beletajn vidaĵojn el Angers kaj el la randoj de rivero Loire interŝanĝe fotografajojn Potin.

Sendu mendojn kaj anoncojn kun poŝtaj mandatoj al « Administranto de Tra la Mondo », 15 Boulevard des 2 Gares, Meudon (S. et O.), France, antaŭ la 20<sup>a</sup> de ĉiu monato, por la venonta numero.

ĈIAM TRE LEGBLE SKRIBI.